

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

N° 7 - 8

Julio kaj Aŭgusto 1960

10-a Jaro

===== RIDUZIONE FERROVIARIA PER IL CONGRESSO DI BRUXELLES =====

Il Ministero dei Trasporti, con lettera N.C.321/119.2/3994/110, ha comunicato che ai partecipanti al 45° Congresso Universale di Esperanto di Bruxelles è concessa la riduzione del 20% sul percorso effettuato sulle ferrovie italiane, dal luogo di residenza al confine e ritorno.

Consigliamo agli interessati di richiedere a tempo il biglietto ridotto alle agenzie di viaggio.

La Ministerio de Transportoj, per letero N.C.321/119.2/3994/110, anoncis ke al la partoprenantoj la 45-a Universalan Kongreson de Esperanto estos donata la rabaton de 20% per aĉeti biletojn sur la itala reto, de la loĝloko al la landlimo, ire kaj reire.

Oni konsilas peti frutempe la reduktitan bileton al la vojaĝ-agentejoj.

===== 12-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO =====

Helsinki (Finnlando) de la 11-a ĝis la 16-a de junio 1960

La Itala karavano forveturis de Bologna la 7-an de junio, vespere, per partopreni la 12-an Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson en Helsinki. En Milano la karavano pligrandiĝis per aliaj delegitoj el Genova, Torino kaj Milano. Per ripozi kaj interrompi la longegan kaj lacigan vojaĝon ni haltis en Hamburg, kie ni estis akceptitaj kaj akompanitaj en rapida vizito al la belecoj de la urbo, inter kiuj la grandega haveno, fare de nia malnova amiko kaj samfakulo S-ro Hartjen kaj de Fin-e Korzen. Post nokta ripozo la 9-an matene ni forveturis de Hamburg rekte al Stockholm kun nur duhora halte en Kopenhago, kie ni renkontis la multnombrajn Franceajn delegitojn kaj atingis nin S-ano Carena el Voghera, kaj D-ro Tesi el Bologna. En Stockholm ni ekkomencis enspiri la Esperantan aeron de la Kongreso. Jam en la stacidomo, post nia alveno, la Svedaj kolegoj atendis kaj helpis nin per atingi la havenon, kie ni aĉetis la ŝipbileton al Turku je rabatita prezo. Dum la tuta tago, ĝis la vespera enŝipiĝo, ni estis en Esperanta rondo, akompanataj de la svedaj kolegoj, tra la belega Stockholm kaj ĝia mirinda parko "Skansen".

La postan tagon ni atingis finfine Helsinki, fervoje de Turku. En la impona stacidomo, la L.K.K.-anoj atendis kaj akompanis nin per aŭtobuso al la kongresejo en la Laborista Instituto, kie ni ricevis la dokumentojn kaj la loĝejon. La Laborista Instituto, kiu estas vespera studejo-prelegejo per junularo kaj plenkreskuloj, estas urba instituto subtenata de la Ŝtato. La programo de tiu instituto estas tre vasta kaj multflanka enhavanta diversajn prelejojn kaj kursojn kaj gvidadon de ekzercaj grupoj en diversaj fakoj de arto kaj klerigo. Tie funkcias, konstante i.a. Esperanto-kurso per komencantoj kaj daŭrigantoj. Vespere en la moderna salono de tiu Instituto okazis la "Interkonatiga vespero" dum kiu, per amuza programo kun folkloraj kantoj kaj dancoj, la gekongresanoj, kvankam iomete lacaj, dancis ĝis noktomezo.

Dimanĉon la 12-an de junio en la fest-teatra salono de la kongresejo okazis la sole-
na malfermo de la kongreso, brile akompanata de la ludadoj de la fervojista orkestro.
Parolis unue la Prezidanto de la L.K.K. S-ro Narvala. La longa parolado de la Honora
Prezidanto de la kongreso Ekki Aalto, ĉefdirektoro de Ŝtataj Fervojoj, estis atente
aŭskultita; li bonvenigis la partoprenintojn en la nomo de la Finlanda Ŝtata Fervojoj
kaj transdonis la saluton de la Protektanto Arvo Korsimo, Trafikministro, kiu ne povis
ĉeesti pro malsano. Poste parolis S-ro Ollsson en la nomo de la Svedaj Ŝtataj Fervojoj,
D-ro Baeskaĵi en la nomo de la Hungara Registaro invitis la Kongreson en Budapeŝto dum la
jaro 1962, S-ro Giessner en la nomo de la Germana Federacia Fervojoj, S-ro Gimelli en
la nomo de la Itala "Dopolavoro Ferroviario" kaj de la Itala Esperantistaro, invitis la
ĉeestantojn al la 31-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto en Cortina D'Ampezzo. La Fran-
ca S-ro Mollion, Prezidanto de F.I.S.A.I.C., kaj malnova amiko de Esperanto parolis, la
unuan fojon, Esperante, longe aplaudita. S-ro Y.Ollilainen, ĉefo de Sociala Servo de Fi-
nna Ŝtata Fervojoj kaj S-ro M.Voltti, Direktoro de Finna Fervoja Instituto, salutis la
ĉeestantojn Esperante kaj Finne per la neesperantistaj aŭtoritatoj. La manifestacio
daŭrigis per la salutoj de la jenaj instancoj: Sveda Fervojista Sindikato, Finna Labo-
rista Instituto, Sveda Esperanto-Federacio, Finnaj Fervojaj Asocioj, Universala Espe-
ranto-Asocio kaj Finlanda Esperanto-Instituto. Laste parolis la reprezentantoj de la
landaj asocioj kiuj ne parolis antaŭe:

Aŭstrio: Ing. Eichinger ankaŭ en la nomo de la Ĝenerala Direktoro de Aŭstria Fervojoj.
S-ro Kovačić en la nomo de Aŭstria Fervoja Sindikato. S-ro Geroldinger nome de I.F.E.F.
Sekeio kaj de Kert. Kons. Hugo Steiner, Direktoro de Internacia Esperanto Muzeo en Vien.
Britujo: S-ro Barks. Danlando: S-ro Christoffersen. Francujo: Fin. Lemonnier. Hispanio:
S-ro Saladrigas. Jugoslavio: S-ro Matić. Nederlando. Norvegujo. Svislando: S-ro Grottert
S-ro De Jong, Prezidanto de I.F.E.F. per resuma parolado, deklaris malfermita la 12-an
Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson.

Posttagmeze multnombraj aŭtobusoj kondukis la kongresanaron tra la urbo kaj ĝiaj
ĉirkaŭaĵoj kun haltado ĉe la granda "Tombejoj de la Herooj", kie estas la tombejo de Marŝa-
lo Mannerheim inter liaj soldatoj. Post la komuna fotografado antaŭ la "Domo de la Ŝta-
to", ni vizitis, akurate, la Parlaŭntojon.

Lunde la 13-an okazis la redaktora kaj terminara kunveno, bonege vizitataj de la de-
legitoj. Posttagmeze la tuta kongresanaro kolektiĝis antaŭ la urbodomo per la oficiala
akcepto de la Urbestro. En la luksaj salonoj de la urbodomo, post la salutvortoj de la
Urbestro, ni atingis la luksan kaj abundan bufedon. La kulturvespero kiu okazis vespere
en la festsalono de la kongresejo, havis tre interesan programon: Orkestramuziko per la
orkestro de la fervojistoj, ĥoro per viraj kaj virinaj voĉoj, popoldancoj de la gejunu-
loj de Karelio, "Kantela"-muziko per tipa Finna muzika instrumento, ludita de lerta
S-ro K.Jokinen, nia sindona tradukisto, gimnastiko per knabinoj de sportsocieto Isku,
solkantado de Sirikka Lehtivaara kaj parolado de Hannes Koivu.

Mardon la 14-an okazis estrara, delegitara kaj fakprelega kunveno; posttagmeze la
Prezidanto de L.K.K., S-ro Narvala, legis interesan fakprelegon kies temo estis: Kiel
la Finnaj fervojoj luktas kontraŭ la vintro". Poste okazis la interesa filmvespero.

Merkredo la 15-an okazis laborkunsidoj. Dum la unuaj tri tagoj la gekongresanoj en
malgrandaj grupoj partoprenis per boatoj al tre interesa vizito tra la insularo de la
haveno de Helsinki kun haltado kaj vizito al la insulo Suomenlinna.

Laborkunsidoj:

Dum la malfermo de la laborkunsidoj oni anoncis ke I.F.E.F. atingis pli ol 2.300
membrojn en 24 landoj, kaj ke estis anoncigitaj al la kongreso 335 kongresanoj el 18 lan-
doj kaj ke efektive ĉeestis 300 el 15 landoj.

Inter la ricevitaj salutleteroj kaj telegramoj oni legis la salutojn de Prof-ro G.
Canuto Prezidanto de U.E.A., de S-ro Catena kaj Lanzoni el Bologna (Italujo), de S-ro
Teo Jung, redaktoro de "Heroldo de Esperanto" kaj de aliaj.

Dum la lasta jaro la Hungara, Jugoslava kaj Pollanda horarlibro enhavas klarigajn
kaj mallongigajn esperantlingvojn, kiel antaŭe la Germana horarlibro; ankaŭ aliaj landoj
klopodas per atingi tiun sukceson. La kongreso rekomendis al la landaj asocioj esplori

la eblecon, ĉu la fervoja administracio konsentas liveri manikobendojn kaj ŝildon kun la vorto "Esperanto" por uniformo de la fervojistoj kiuj deĵoras por servainformado al la eksterlanda publiko. Por la titolpaĝo de "La Internacia Fervojisto" oni decidis instigi kvin aŭ ses desegnistojn inter niaj kolegoj, fari desegnaĵojn kaj el ili elekti la plej taŭgan.

La Estraro, kaskontrola kaj konflikta komitatoj estis reelektitaj. La 13-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso okazos de la 6-a ĝis la 13-a de majo 1961 en Barcelona (Hispanio); la temo de la fakprelego dum tiu kongreso estos: Evoluo kaj kialoj de la malsama ŝpuro de la trakoj inter diverslandoj kiel ekzemple Hispanio, Portugalujo, Ruslando kaj Finnlando, kies relŝpuroj estas pli larĝdimensiaj kompare kun la aliaj Eŭropaj nacioj. Sistemo kaj funkciado por kontraŭbatali tian hodiaŭan malhelpaĵojn. Dum 1962 la 14-a I.F.E.F.-Kongreso okazos en Budapeŝt laŭ la varma invito farita de D-ro Bačkai en la nomo de la Hungara Trafikministro S. Kossa kaj de la Hungara Registaro.

Merkredon vespere la kongresa balo finis la tagojn de la kongreso en Helsinko. Dum la balo oni lotumis la premiojn de la tambolo. La unua premio, arta reproduktaĵo de la mara Dio "Neptuno" donacita de la "Dopolavoro Ferroviario" de Bologna, multe impresis la ĉeestantojn kaj ĝojigis la germanan gajninton.

Tuttaga Ekskurso:

Ĝaŭde la 16-an de junio matene ni forveturis trajne el Helsinko kaj atingis, post unu horo kaj duono, la urbon Hameenlinna-n. Tie ni vizitis la parkon Aulanko-n situantan en bela akva ĉirkaŭaĵo. En la hotelo Aulanko, unu el la plej luksaj el Finnlando, situanta en tre bela parto de la parko ĉe la lagbordo, ni ripozis kaj trinkis babilante. De tie ni daŭrigis per ŝipo (akvo-omnibuso) sur kiu ni tagmanĝis dum la vojaĝo, laŭlonge la tiel nomata "Argenta linio", la vojaĝon al Tampere, kie ni vespermanĝis kaj, post rapida vizito al la urbo, la trajno revenis al Helsinko. Mi kune kun aliaj gekongresanoj restis en Tampere por viziti icmete pli akurate la duan urbon de Finnlando. Mi daŭrigis poste la vojaĝon norde tra Oulu kaj Kemi al Rovaniemi kie mi restis du tagojn por viziti la Artikan Polar-Cirklon kaj vidi la meznoktan sunon sen malleviĝo. Poste mi vizitis Kemi kaj Tornio, kaj tra Haparanda, Boden kaj Upsala, ĉirkaŭis la Botnian Golfon dum la reira vojaĝo ĝis Stockholm. De Stockholm tra Kopenhago, Hamburgo, Hannover k.t.p. mi alvenis hejmen post 15 tagoj laca sed feliĉa.

G. Gimelli

XXXI-a CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO

Comitato Organizzatore: Cortina D'Ampezzo - Segreteria: Azienda Autonoma di Soggiorno CORTINA D'AMPEZZO, KONGRESURBO IDEALA 10 - 16 Settembre 1960

Certe malmultaj landoj havas tiom da taŭgaj kongresurboj kiom Italujo, tiel ke la elekto de ĉiujara konsidejo estas tre facila por ni, pro la ebleco viziti ĉiam novajn urbojn egale interesajn. Kaj certe post tridek Naciaj Kongresoj tiu ebleco ne estas ankoraŭ elĉerpita, ĉar neelĉerpebla estas la nombro kaj la kvanto de artaj kaj naturaĵoj de Italujo, same kiel de sciencaj muzeoj kaj historiaj restaĵoj; kiuj, krome, estas tiel malsamaj kaj specialaj, kiel nur itala historio kaj geografio ebligas.

Kaj certe al tiu riĉeco kaj diverseco deviga, krom la Esperantemo de niaj samideanoj, la multnombra alkuro de partoprenantoj, ĉu italaj, ĉu eksterlandaj, al niaj Naciaj Kongresoj; ĉar ĉiu nia Kongreso estas oportuna okazo kapti, laŭ nia proverbo, pluraĵajn kolombojn per unu grajno: nome, viziti mond-famajn urbojn, regionojn, insulojn ofte deziratajn, sed eble tro malproksimaj por decidigi nin al unucela vojaĝo, sed nepre vizitendaj, se al ties allogaĵoj aldoniĝas la perspektivo renkonti en intima kongresa atmosfero niajn malnovajn kaj novajn geamikojn, kaj travivi tiun festan aventuron, kiu estas ĉiam Esperanto-Kongreso.

Roma, Firenze, Palermo, Bologna k.t.p. estas tiaj nomoj, kiuj ne nur vekas oĥojn en italaj koroj kaj mensoj, sed en tiuj de iuj ajn landanoj, kaj estas el si mem invitoj, al kiuj oni malfacile respondas nee. Nu, sub historia aŭ arta vidpunkto nia eta Cortina ne pretendas, eĉ ne kuraĝas alproksimiĝi al ili. Sed, ĉu ne ekzistas aliaj allogaĵoj, krom tiuj altvaloraj trezoroj kaj ecoj? Ĉu kelkfoje ne estas lacige kuradi de FEI-kunveno al Muzeo, de I.F.E.A.-kunsido al Pinakoteko, de I.L.E.I.-kunsido al Arta Kolekto, k.t.p.? Aŭ ĉu ne estas bedaŭro forlasi pro manko da tempo ne vizititaj arta-

ĵojn, aŭ perdi aliajn kongresajn programerojn? Ĉu me, kelkfoje, estus dezirinde sekvi pli trankvile la kongresajn temojn, sen perdi ion de la lokaj belaĵoj? Ne esti devigataj kuri, kuradi, por serĉi ilin, sed enesti, enlabori, envivi inter ili?

Ĉi tio eblas en Cortina, ĉi tio okazos en Cortina: ĉi tio estos, ja, la funda karaktero de la XXXI-a. Tiel estas.

Ĉiu nia matena malfermo de okuloj estos ekvizito de ĉefverka pentraĵo. Ĉu la fenestro de via domo-ĉambro rigardos suden? Tiam "Croda da Lago", kaj "Tagneza Boko" levos siajn rozkolorajn krestojn por krii al vi sian "bonanmatenon"; Ĉu via fenestro sin turnas norden? Tiam la imponaj "Panagagnon" kaj "Cristallo" mallevos siajn frontojn por saluti vin. Ĉu orienten? Nu, depost la akropinta "Soparis" la suno mem eliros, por promesi al vi feliĉan kaj ĉarman tagon. Ĉu okcidenten? Do vi ĵetos vian uman rigardon kontraŭ la magie-rugiĝantaj "Tofane".

Sed kion diri pri la kvietiga valo, tra kiu fluadas brulante la toronto, nigras la arbaroj, verdas, kaj preskaŭ "violas", pro la ega kvanto de kolĉikoj, la herbejoj? Sed mi ne volas forgesi rememori vin pri la vespero en Cortina, pri ties mirindaj sunsubiroj, tiel karakterizaj, pro la fama "enrozadiro" (ĉu tiu ĉi loka dialekta vorto, tiel esperantosona, bezonas tradukon?). Jen pro kiu mirindaĵoj famigis Cortina en la tuta mondo. Kaj tamen ĉi tiuj ne estas la muraj allogaĵoj de nia Kongresurbo. Ankaŭ ĉi tie al la eksterordinaraj naturaj ecoj aldoniĝas iuspecaj artaj kreaĵoj: tiuj estas: skiliftoj, skipistoj, ŝnurvojoj, skisaltiloj, bobkursejoj, kaj la impona Olimpia Stadiono por la glasiludoj. Tio estas la riĉa kaj moderna ilaro, per kiu ne nur amuziĝas miloj da turistoj kaj sportistoj de la tuta mondo, sed ankaŭ fermiĝas kaj pretiĝas la lokoj anoj de pli ol dek sportaj kluboj, el kiuj eliraĝas mondkonataj ĉampionoj: t. e. skiistoj, bobistoj, alpinistoj, k. t. p.

Tio estas Cortina; kaj pro tio en Cortina kunvenas sendese Kongresoj, ĉu sciencaj, ĉu artaj, ĉu sportaj. Kutime la aliaj kongresoj preferas aŭ vintron aŭ someron, ĉar tiam la monduma kaj snoba vivo estas pli viva kaj vigla; ni, male, kunvenos je la fino de la somero, pro multaj kialoj; sed tio estas certe bonŝanco, ĉar la urbeto ne estas plenkona, sed precipe ĉar la vetero, ofte nekonstanta, tiam estas kutime pli bela. Pro tiuj konsideroj oni elektis la saman tempon por la grava aŭtomobilista manifestacio, kiu nomiĝas "Trofeo Supercortemaggiore", kiu okazos tuj post nia Kongreso, kiam partoprenos pli ol mil konkurentoj, kaj kiam ni mem povos admiri restante unu tagon pli en Cortina.

La turistoj, ja, elektas vintron kaj someron por viziti nian urbon, ĉar ili aŭ bezonas neĝon por siaj vintraj sportoj, aŭ disponas libertempon nur dum la somero. Sed tiel ili vidas neniam la unuajn florojn de Cortina, kiuj estas la krokusoj, nek la lastaj, la kolĉikoj; dum nia Kongreso havos siajn alpajn florojn.

C. Agostini

KONGRESO DE POPOLUNIVERSITATOJ

Strasburgo (Francujo), 9 - 12 septembro 1960

La 3-a Universala Kongreso de la Popoluniversitatoj okazos en Strasburgo (Francujo) de la 9-a ĝis la 12-a de septembro 1960 en la Palaco de la Universitato.

La Organiza Komitato de tiu kongreso enhavas du esperantistojn: S-ro Pierre PETIT, prezidanto de la Eŭropaj Popolaj Universitatoj, komitatano de U.E.A. estas ĝia vicprezidanto, kaj S-ro Hubert PEREZ, helpĝenerala sekretario. Plej gravaj personoj de la Universitataj medioj kaj de la Eŭropa Konsilantaro partoprenas la Organizan Komitaton.

Esperanto estos unu el la oficialaj lingvoj por la preparo de la kongreso. En la du antaŭaj kongresoj, Esperanto estis la sola traduklingvo. Povos okazi same en Strasburgo, kondiĉe ke kiel eble plej da delegitoj scipovu Esperanton.

Tiacele ni rekomendas al la esperantistoj, kiuj havas rilatojn kum la Popoluniversitatoj, ke ili klopodu fariĝi iliaj reprezentantoj en la kongreso en Strasburgo.

Pri detaloj oni skribu al S-ro Hubert Perez, helpĝenerala sekretario de la Organiza Komitato por la 3-a Universala Kongreso de la Popoluniversitatoj, 9 place de l'Université, STRASBOURG (Bas-Rhin) Francujo)

LA FLOROJ DE CORTINA ATENDAS VIN! Aliĝu baldaŭ el nia XXXI-a Kongreso!

GEMELIĜO INTER BAD KISSINGEN KAJ MASSA PERE DE ESPERANTO

Danke al la agado de la Esperanto-Grupoj de Massa kaj Bad Kissingen okazis dum la pasinta aprilo, kunlabore kun la du urbaj grupoj de la Eŭropa Federacio, la Gemeliĝo inter la menciitaj urboj. Jam de la 15-a de aprilo alvenis en Massa la karavano de la Germanoj (inter kiuj la urbestro de Bad Kissingen D-ro Weis) por partopreni la antaŭplanitajn manifestaciojn de la Gemeliĝo mem. Estis elektita Esperanto kiel sola oficiala lingvo.

Dum tiu feliĉa okazintaĵo, ankaŭ ĉijare la Italaj Grupestroj estis invititaj al Nacia Jara Kunveno por diskuti la agadon en la dua parto de "Zamenhof-Jaro" (daŭrigota la tuta jaro 1960-an pro iniciato de U.N.E.S.C.O.).

La Jara Nacia Kunveno de la grupestroj okazis en Marina di Massa ĉe Azienda Autonoma di Soggiorno (Villa Cuturi). Okazis danofestoj, vizitoj al lokaj naturaj aŭ artbelaĵojn krome estis je mia dispano ĉarma strando ĉe la ĉiel-blua maro antaŭ Massa.

ESPERANTO ANSTATAŬAS LA LATINAN LINGVON EN EKZAMENOJ

Tri studentoj de Helsinki petis la permeson ekzameniĝi en Esperanto anstataŭ en latina lingvo, por la atingo de la atesto pri matureco. La Instrua Administracio, kiu decidas pri tiaj esceptaj ŝanĝoj en la studprogramo de la lernejoj, petis per oficiala letero, ke la instruisto Vilho Setälä, Membro de la Akademio de Esperanto, ellaboru planon por adekvata kurso de trijara daŭro, po 5 lecionoj ĉiusemajne, de latino aŭ alia fremda lingvo en la Ŝtataj Liceoj.

La Administracio, post ekzamenado de la studplano, ĝin aprobis kaj permesis al la junuloj efektiviĝi la ekzamenon en Esperanto, kondiĉe, ke ĝi okazu kun la ĉeesto de instruisto de Esperanto, aprobita de la Akademio de Esperanto.

ESPERANTO - FILATELO

Serie de 22 poŝtkartoj kiuj prezentas - grandformate - ĉiujn poŝtmarkojn ĝis nun eldonitajn kun teksto en Esperanto. La serie kostas, inkluzive la sendelspezoj al eksterlando per rekomendita letero, 15 internaciajn poŝtajn respondkuponojn.

Skribu al: Sicilia Delegacio de Itala Esperanto Federacio - Corso Vittorio Veneto, 92 Ragusa (Italio).

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia)

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). Ondlongejoj: metroj 30,90 = Mc/s. 9,71; metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s. 5,96.

Prelegantoj: mardo: alterne S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella

merkredo: S-ro Luigi Minnaja kaj vendredo: Prof. D-ro Vincenzo Musella.

DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1960 - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

AŭGUSTO 1960-a - Mardon la 2-an: Tra la literaturo - vendredon la 5-an: Vizite al Romo de la Olimpikoj - mardon la 9-an: Italaj Provincoj: Belluno - vendredon la 12-an: Grandaj Sanktuloj: Sankta Reza el Lima - mardon la 16-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 19-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 23-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 26-an: Malfemigas la Olimpikoj en Romo - mardon la 30-an: Italaj kanzonoj en Esperanto.

SEPTEMBRO 1960-a - Vendredon la 2-an: La Reĝa Palaco de Caserta - mardon la 6-an: Tra la literaturo - vendredon la 9-an: Italaj provincoj: Sondrio - mardon la 13-an: Grandaj Sanktuloj: Sankta Luiza el Méryllac - vendredon la 16-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 23-an: Leterkesto kaj bibliografio mardon la 27-an: La unua opero: "Euridice" de Jacopo Peri - vendredon la 30-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: Alphonse de Lamartine.

La Faktestro: L. MINNAJA

LA POLA RADIO DAŬRIGAS EL VARSOVIO ĈIUTAGAJN ESPERANTO-PROGRAMOJN

Se vi interesiĝas pri Pollando, se vi ŝatas polan popolan muzikon, se vi sciolas pri Esperantista movado en la diversaj partoj de la Zamenhofs lando, lulilo de nia internacia lingvo, aŭskultu la ĉiutagajn elsendojn de Radio Varsovio. Ĝis la 15-a de oktobro 1960, la programoj estas aŭdeblaj de la 16,30 ĝis la 17,- h. (M.E.T.) sur la maza ondo 249 metroj (7125 kos.) kaj sur la jenaj mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 34,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 metroj.